

Johann Wolfgang von Goethe, Trovita <i>tradukita de Manfred Retzlaff</i>	Johann Wolfgang von Goethe, Trovajo <i>tradukita de Ri- chard Schulz</i>	Johann Wolfgang von Goethe, Trovita <i>tradukita de Antoni Grabowski</i>	Johann Wolfgang von Goethe, Gefunden
Mi tra arbaro Sencele iris Kaj trovi ion Mi ne deziris.	Mi vagis sola En la arbar'. Nenion serĉi Jen mia far'.	Mi foje arbaron Promene eniris, Kaj serĉi nenion En penso deziris.	Ich ging im Walde So für mich hin, Und nichts zu suchen, Das war mein Sinn.
Ĉe l' vojo vidis Mi etan floron, Kaj ege tuŝis Ĝi mian koron.	Enombre vidis Floreton mi. Lumanta stelo, Okulvizi'.	Mi vidis, en ombro Jen staras floreto: Steleto lumanta Aŭ blu-okuleto.	Im Schatten sah ich Ein Blümchen stehn, Wie Sterne leuchtend, Wie Äuglein schön.
Kaj kiam volis Mi ĝin deŝiri, „N rompu min!“, mi Ĝin aŭdis diri.	Al mi plukonta Jen ĝia vort': „Ĉu ke mi velku Al frua mort' ?“	Mi volis ĝin ŝiri, Sed plore ĝi diras: “Ĉu por ke mi velku, Vi tial min ŝiras?”	Ich wollt' es brechen, Da sagt' es fein: „Soll ich zum Welken Gebrochen sein?“
Kaj mi singarde Ĝin elterigis, Al mia domo Ĝin translokigis.	Mi ĝin elfosis Kun la radik' Ĝin portis domen Al la larik'.	Do mi ĝin elfosis Kun radikareto, Kaj portis al mia Ĝarden' ĉe l' dometo.	Ich grub's mit allen Den Würzlein aus, Zum Garten trug ich's, Am hübschen Haus.
Alialoke Ĝi nun kreskadas, La eta planto Kaj plu floradas.	Replantis tie Ĝin en la fru'. Ĝi nun kreskadas Kaj floras plu.	En loko trankvila Plantite karese, Ĝi kreskas, burĝonas, Kaj floras senĉese.	Und pflanzt' es wieder Am stillen Ort; Nun zweigt es immer Und blüht so fort.
...	...	...	...

*Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1982-05-05.*

*MR-010-1 / Arg-376-739 (2006-12-11 22:15:22)*

*Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (Rikardo Ŝulco, \*1906-07-12 - †1997-09-26) en 1984-07.*

*Arg-376-740 (2013-02-26 15:17:50)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo aperis en la n-ro 61 (1984/7) de la Vestfaliaj Flugfolioj, kiujn eldonis Richard Schulz, kiu loĝis tiutempo en la germana urbo Mindeno (Minden). Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Richard\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz).*

*Traduko de la Germana poemo "Gefunden" de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22) en Esperanton de ANTONI GRABOWSKI (\*1857-06-11 - †1921-07-04).*

*Arg-376-741 (2006-12-14 00:07:48)*

*Mi, Manfred Retzlaff, trovis tiun ĉi traduk-version en la interreto, en la retejo de s-ano Don Harlow, en <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/Literaturo/Poezio/parnaso/>, precize sub <http://donh.best.vwh.net/Esperanto/iteraturo/Poezio/parnaso/ trovita.html>.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (\*1749-08-28 - †1832-03-22).*

*Arg-376-738 (2006-12-11 22:11:49)*